
# BONA ESPERO



Cirkulero por amikoj, subtenantoj
kaj membroj de la "Subtenanta
asocio de Bona Espero"

n-ro 2 novembro 1981

**Tre** malfrue ĉifoje aperas nia cirkulero, sed la Universala Kongreso kiel ŝtormo trablovis Bonan Esperon; pro tio ĝiaj enloĝantoj nur nun povas iomete ripozi. Tial ni kompreneble ankaŭ ne havas tiom da informoj el Brazilo.

**Kion** ni scias:
komence de oktobro nova estraro por "Fazenda-Escola Bona Espero" estis elektita. Por la venontaj tri jaroj ĝi konsistas el la jenaj personoj:

Generala direktoro:
Arthur Vellozo Vasconcellos,
Administra direktoro:
Enivaldo Alves Silva,
Financdirektoro: G. Grattapaglia,
Soci-eduka direktoro: U. Grattapaglia,
Publikaj rilatoj:
Neuza Esteves Araujo.
Preskaŭ
Ĉiuj estraranoj loĝas en Bona Espero.

Tuj poste la estraro faris liston de la plej urĝaj solvendaj problemoj: la grundlimoj devas nepre esti ĉirkaŭataj per pikdrato, por ke neniu alia okupu la terenon; tre urĝe bezonata estas ankaŭ nova VW-buseto (kiel longe jam?), ĉar la malnova nur konsistas el rusto kaj laca motoro kiu nur ankoraŭ povas transporti la lignon por la bakforno. Krom tio nova tegmento sur la plej granda loĝdomo devas esti konstruata, ĉar momente la pluva sezono tie zorgas pri fluanta akvo en ĉiuj 20 ĉambroj (kia lukso!).

Intertempe ili finkonstruis du sanitarajn instalaĵojn. Ankaŭ la Universala Kongreso ne povis malhelpi tion. Momente oni preparas la grundon por plantado de diversaj fruktarboj. Kompreneble ankaŭ maizo, fazeoloj kaj aliaj bezonataj legomoj estos semataj.


Estas ja ĉiam la sama afero - en Bona Espero oni multe laboras.

**Sed** ankaŭ ni ĉi tie ne lacas!
La societo kreskas. Malrapide, treniĝante, sed nehaltigeble. Intertempe preskaŭ 60 amikoj el la tuta mondo estas membroj ĉe ni kaj krom la regulaj membrokotizoj ni ankaŭ ricevis kelkajn donacojn. Ursula Grattapaglia venos en Marto al Eŭropo por partopreni la UEA-Estrarkunsidon kaj ni esperas tiam havi la eblecon donaci al ŝi almenaŭ la monon por "duona" aŭtobuseto. Tiu estas alta celo, sed ni tre ŝatus atingi ĝin.

Momente ni pasigas la tempon per la pakado de paketoj. La enhavo: medikamentoj por Bona Espero. Kelkaj medikamento-firmaoj estis tiom afablaj donaci al ni vitaminojn, antibiotikaĵojn kaj medikamentojn kontraŭ gripo kaj tuso. Ili nun atendas en deponejo kaj jen kaj jen ni sendas ilin al Brazilo.

**Du** muŝoj per unu frapo!
Aboni "MONATO"n kaj subteni Bonan Esperon!

Ni disponas pri ses abonoj de "MONATO" por 1982. Uzu la ŝancon konatiĝi kun "MONATO" kaj samtempe helpi al Bona Espero. Sendu monon kaj mendon al ni kaj ek de januaro 1982 vi apartenos al la novaj legantoj de "MONATO". Abon-tarifo por "MONATO" estas: 59,50 DM aŭ 133,- S.kr aŭ 64,- Gld. aŭ 137,- FF.



respondecas/verantwortlich: Barbara Brandenburg, Am Burgweiher 64, 53 Bonn 1
Ktoj. de Bona Espero e. V., Schmittingheide 17d, D-4400 Münster:
Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60, Kto.-Nr. 900 826 'Bona Espero' ---
Postscheckamt Dortmund Kto. Nr. 2033-99-465.

# BONA ESPERO



Rundbrief für die Freunde, Förderer und Mitglieder des Fördervereins "Bona Espero" e. V.

Nr. 2 November 1981

**Ziemlich** spät sind wir dieses Mal mit unserem Rundschreiben dran, aber der Universala Kongreso kam wie ein Wirbelwind über Bona Espero, so daß die Bewohner erst jetzt dazu kommen, etwas nach Luft zu schnappen. Uns fehlt es dadurch natürlich etwas an Informationen.

**Was** wir wissen:
Anfang Oktober wurde ein neuer Vorstand für die "Fazenda-Escola Bona Espero" gewählt. Für die nächsten drei Jahre wird er sich so zusammensetzen:

Generaldirektor:
Arthur Vellozo Vasconcellos,
Verwaltungsdirektor:
Enivaldo Alves Silva,
Finanzdirektor: G. Grattapaglia,
Direktor für Sozialerziehung:
Ursula Grattapaglia,
Öffentlichkeitsarbeit:
Neuza Esteves Araujo.
Fast
Alle Vorstandsmitglieder leben auf Bona Espero.

Gleich anschließend stellte der Vorstand eine Liste der Dinge auf, die am nötigsten zu tun seien: das Land muß mit Stacheldraht umzäunt werden, damit niemand sich das unmarkierte Land aneignen kann; ein neuer VW-Bus muß dringend her (wie lange schon?), da der alte praktisch nur noch aus Rost und einem müden Motor besteht, der es gerade noch schafft, das Holz für den Backofen zu transportieren. Außerdem muß dringend ein neues Dach für das große Wohnhaus gebaut werden, weil es momentan wegen der Regenzeit in allen 20 Zimmern fließendes Wasser gibt (ein etwas zu großer Luxus!). Soweit die neuen Vorstandsbeschlüsse.

In der Zwischenzeit wurden erstmal zwei neue Badezimmer gebaut und trotz des Universala Kongreso auch fertiggestellt. Im Moment wird der Boden für das Pflanzen verschiedener Obstbäume vorbereitet und natürlich werden auch Mais, Bohnen und andere Gebrauchsgemüse gesät. Also - auf Bona Espero wird wie immer viel gearbeitet.

**Aber** auch wir sind hier nicht faul! Der Verein wächst. Zwar langsam, schleichend, aber unaufhaltsam. Inzwischen zählen etwa 60 Freunde aus aller Welt zu unseren Mitgliedern und neben den regelmäßigen Mitgliedsbeiträgen gingen auch einige Spenden auf unserem Konto ein. Wenn im März Ursula Grattapaglia nach Europa kommt, um an der UEA-Vorstandssitzung teilzunehmen, hoffen wir, ihr wenigstens das Geld für einen "halben" VW-Bus zur Verfügung stellen zu können. Ein hohes Ziel, das wir nur zu gerne erreichen würden!

Im Moment verbringen wir auch einige Zeit damit, Arzneimittelpakete nach Brasilien zu schicken. Mehrere Arzneimittelfirmen waren so freundlich, uns für Bona Espero unentgeltlich Vitamine, Antibiotika, Grippe- und Hustenmittel zur Verfügung zu stellen. Diese werden jetzt in einem Depot gelagert und bei Bedarf nach Brasilien geschickt.

**Zwei** Fliegen mit einer Klappe!
Bestellen Sie "Monato" und unterstützen Sie Bona Espero!

Wir verfügen über sechs Jahresabonnements von "MONATO" 1982. Nutzen Sie diese Möglichkeit, mit "MONATO" bekannt zu werden und gleichzeitig Bona Espero zu unterstützen. Senden Sie die Bestellung und das Geld an uns und ab Januar 1982 werden Sie zu den neuen Lesern von "MONATO" gehören. Zahlen Sie 59,50 DM oder 133,- S.kr oder 64,- Gld. oder 137,- FF auf unser Konto bei der Sparda-Bank Münster oder Postscheckamt Dortmund 2033-99-465 Bona Espero e. V., Schmittingheide 17d, D-4400 Münster.